

# Informa Bulteno de la Esperantista klubo en Brno

---

---

N-ro 12 Aprilo 1932

---

Por membroj la bulteno estas senpaga, sed ĉiu estas petata doni libervole ian sumon por kovri niajn elspezojn. Kiu deziras poŝte ricevi la bultenon, devas pagi almenaŭ la poŝtelspezojn

---

## Pli multe da idealismo

Fundamenta nia manko estas, ke ni ne konscias la necesecon, ke la Esperantisto estu idealisto. - Ni estas ĝis nun malmultaj, aŭ pli bone dirite, ni estas malmultaj organizitaj kaj konsciaj, por nia afero laborantaj. Jam pli granda estas nombro de procentoj de tiuj homoj, kiuj Esperanton scias aŭ ĝin almenaŭ lernis. Certe okazas al vi, ke eĉ inter viaj konatuloj vi trovas personojn, kiuj diras: "Mi ankaŭ lernis Esperanton, mi havas hejme lernolibron" kaj simile. En la tempo, kiam ili Esperanton favoris, ĝi certe ilin interesis kaj ili rekonis ĝian pravecon. Kial do ili nun estas indiferentaj? Tie ĉi ni estas ĝuste ĉe la radiko de la malbono. Ili nome vidis, ke la lingvo internacia, kvankam viva kaj necesa, tamen estas ankoraŭ parte ideo, kaj ili ne estis inklinaj disvastigi novan ideon, pro sia oportuneco kaj malgranda idealismo. Ili ĉiuj devus vekiĝi kaj grupiĝi. Ĉiuj Esperantistoj, eĉ tiuj ĝis nun pasivaj devus kuniĝi kaj organiziĝi, ĉar ankaŭ tie ĉi estas valida la proverbo: "En organizo estas forto." Kaj ni devas konservi ĉiuj kaj ĉiam niajn interrilatojn kun niaj centroj, eĉ kiam ni vidas diversajn riproĉindaĵojn. Ni ne dissplitiĝu! Kiel nia Majstro ĉiam akcentis, Esperanto portas en si ideon multe pli profundan ol sole lingvan: la ideon de l' interfratiĝo de l' homaro. Uzante la internacian lingvon, kiu apartenas al neniu aparte kaj tamen al ĉiuj kune, ni troviĝas sur neŭtrala, efektive internacia fundamento, kian sen Esperanto eĉ en plej amikaj internaciaj interrilatoj neniu povas atingi. Ĉe ni malaperas tiuj hodiaŭ plej fortaj ankoraŭ baroj, elstarantaj la diversaj nacioj, la baroj lingvaj.

La mondo ĉiam pli malgrandiĝas per novaj inventoj, la interrilatoj internaciaj fariĝas ĉiam pli oftaj, sed la diverslingveco faras ilin malfacilajn. Proksima estas jam la tempo, kiam la vivo altrudos al la popoloj Esperanton. La homa societo iras renkonte al granda renaskiĝo, je kiu oni devas esti preparita. Kaj tie ĉi aktivaj Esperantistoj povas al si diri, ke ilia laboro ne estas vana, kontraŭe, ke ĝi estas pli signifa ol iam kaj ke ili faras grandan verkon por rekonstruo de la mondo.

Jaromír Hoffner

---

## V-a ĈEĤOSLOVAKA KONGRESO DE ESPERANTO EN OLOMOUC

de 14. - 16. majo 1932, dum pentekosto.

El la programo ni citas:

- 14./V. 20 h Amika senprograma interkonatiĝa vespero.
- 15./V. 10 h Solena malfermo de la kongreso kaj laborkunsido.
  - 12 h Solena plantado de "Arbo Esperanto" Fotografado kaj malkovro de la tabulo "Ulice – strat – Dra Zamenhova".
  - 13 h Tagmanĝo en laŭvolaj restoracioj

15 h Laborkunsido  
18 h Vizito de urbaj vidindaĵoj  
20 h Amuza vespero kun dancado. Enirpago por dancontoj Kĉ 6,-.

16./V. 8 h Katolika Diservo kun esp. prediko en preĝejo de Ursulaninoj  
9 h Laborkunsido  
12 h Rigardo al plena funkciado de astronomia holoĝego, poste komuna aŭ laŭvola tagmanĝo.  
13.30 h Ekskursoj al Bouzov, Mladeĉ, Sv. Kopeĉek.

Kongresa kotizo: Kĉ 15,-, familianoj, laboristoj kaj studentoj Kĉ 10,-.

Ĉiu kongresano ricevos: metalan insignon, literaturaĵon, ilustr. gvidilon tra Olomouc kaj kelkajn ilustr. vidaĵkartojn kun esp. teksto.

Ĉe arbo "Esperanto" estos starigita granita memorbloko. La memorbloko portos sub la kvinpinta stelo jenan enskribon: Arbo ESPERANTO. Dum estrado de ŝtatprezidanto T.G.Masaryk, de urbestro Dro F. Fischer, plantita 15./V. 1932 por honoro al Dro L.L.Zamenhof, de V-a ĉsl. Esperanta kongreso kaj de .... nomoj de Esp. kluboj kaj societoj.

*Estimataj.*

*Tutŝtatan signifon kaj daŭre valoran efikon havos tiu ĉi kongresa okazaĵo. La nomo de nia klubo ne mankos ĉe tiu grava manifestacio. Permesos tion nek nia arda deziro efike kunlabori kaj propagandi, nek sento de agnosko al gesamideanoj el Olomouc, nek nia fiero. La nomo de nia klubo estos engravurita en la memorblokon ĉe "Arbo Esperanto". La sumo, kiun ni devos oferi, estas por ni sufiĉe konsiderinda, tial, por parte kovri niajn elspezojn, ni invitas vin al etaj monoferoj. La unuaj donacintoj estas: Gesamideanoj s-ino Adamcová, Jarosl. Hoffner, Rud. Nečas, E. Sonnefeld, J. Vondroušek, ĉiuj po Kĉ 10,-.*

*J. Vondroušek*

Pluaj aliĝintoj el Brno al la kongreso:

S-ino M. Adamcová, f-ino M. Ondráčková, s-ro Lumír Caha, s-ro Frant. Míček.

-----

## El la kluba vivo

Gazetoj pri Esperanto (nur el Brno): Lidové Noviny 2./4. pri esp. poŝtkartoj de Lichtenstein, Moravské Noviny 28./2. pri la samo. Lidové Noviny 3./4. pri esper. traduko de "Tridej jaroj en la ora nordo". Moravské noviny pri esperanta manifesto de Kantona universitato kontraŭ Japana invado.

J. Vondroušek

-----

Atentu bone! Kunvenoj de brnaj Esperantistoj okazas regule ĉiumarde je la 20a en bela klubejo (box 1) de hotelo Passage. Venu, Vi estos kontentaj!

-----

Nia ĝenerala kunveno okazis la 20an III. 1932 en hotelo Passage. Prezidis s-ro insp. Baďura. Vigla diskuto pri diversaj proponoj de klubanoj montris intereson de anoj pri la kluba vivo. Akceptita propono pri kunlaborado de klubo kun pacaj, efikaj kaj similaj organizaĵoj. Starigita informa servo, konsistanta el 4 membroj, kiuj prizorgos priesperantajn sciigojn en gazetaro. Denove estis decidite, peti la urbeŝtraron, ke ĝi nomu ian straton Zamenhofova aŭ Esperanta. Nova komitato: s-inoj Strejčková, Adamcová, s-roj Baďura, Vondroušek, Hoffner, R. Nečas, Poláček, Topič, Strejček kaj Sonnenfeld.

Donacoj al nia klubo. Nenomita Kĉ 20,-, s-ro Fr. Drlík, distr. pol. insp. Kĉ 10,-, s-ino Adamcová

Kĉ 10,-, s-ro R. Neĉas Kĉ 10,-, s-ro Válka Kĉ 10,-, s-ano Šeránek Kĉ 3,-.

**Esperanta parolado en Brno.** Nia samideanino, s-ino Strejĉková, parolos dimanĉe la 17-an je la 18a horo kaj 50 minutoj (10 minutoj antaŭ la 7-a) pri la "IX-a Tutsokola kongreso en Praha" en la radio-stacio de Brno. Aŭskultu ĉiuj la paroladon kaj skribu aproban leteron al la Radio-Ĵurnalo, Brno!!

---

## Esperanta movado

Statistiko pri Esperantistaj instruistoj. Laŭ la statistiko de "International Auxiliary Language Association" en Nwe York, laboras por Esperanto en 1.021 lernejoj 6737 geinstruistoj el 60 landoj.

Kuo Min, universitato, Canto, Ĥinujo, dissendas monden proklamon en esp. verkitan 4 paĝan protestanta kontraŭ japanaj buĉado, perforto kaj imperiisma invado. Ni transdonis al 5 redakcioj de lokaj gazetoj kun akompana letero.

J. Vondroušek

---

## Literaturo

### Harmonio de animoj.

Du homoj, geedzoj, decidis eksedziĝi, ĉar ili ne komprenis unu la alian kaj neniu el ili volis konfesi, ke li estas kulpa. Ili eksedziĝis, disiris, kaj nune nur atendis, ĝis pasos la libertempo necesa por disiĝo. Sed ne fartas bone esti sola, eĉ se tio estas eksedziĝinta viro. Pro tio donis la juna eksedzo en la gazeton anoncon, kie li serĉis amikinson, sub ĉifro "Harmonio de animoj". Kompreneble li ricevis multege da respondoj, sed nur unu li elserĉis. Ĝi estis letero de virino, kiu skribis delikate, noble, saĝe. Ankaŭ ŝi skribis nur sub ĉifro. Inter la du ĉifroj ĉiam pli kaj pli da plezuro kaj simpatio, ĝis fine el la interŝanĝo de ideoj evoluis plena korespondado. Kaj kiam inter la du homoj etiĝas erotika kateno, eĉ ne la abismo povas reteni ilin, ke ili ne volu sin ekvidi. Imagu nur, tiuj noblaj homoj, kiuj perletere tiel bone harmoniis, kia estis ilia harmonio vizaĝo kontraŭ vizaĝo. Ili donis al si rendevuon, je forlasita angulo, ambaŭ viol-bukedon en la mano. Li alvenis pli frue kaj malpacience atendis, fine alvenas virino en vualo portante violojn. Ŝi alvenis ĝis ĉe li kaj levis la vualon. Duobla ekkrio de surprizo. Rigardis sin la geedzoj, kiuj disiris, ĉar ili ne povis interkonsenti.

Tradukis M. Adamcová

---

La Bulteno aperas kelkfoje dum jaro, laŭbezone. - Redaktoro: Ernst Sonnenfeld.  
Eldonanto: Esperantista klubo en Brno, Veveří 28 – Hektografas: Alois Strejĉek

Enkomputiligis Miroslav Malovec, 2014-04-10